

Werner Bormann

Bona Ŝanco

Claude Gacond, 413-a radioprelego, 1971.09.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la lastaj monatoj aperis pluraj gravaj kaj interesaj verkoj. Inter ili la libro titolita *Bona Ŝanco* de Werner Bormann estas aparte interesa kaj ideoplena por la personoj, kiujn interesas la estonteco de esperanto.

A.- La titolo *Bona Ŝanco* tuj montras, ke Werner Bormann opinias, ke bona ŝanco ekzistas por esperanto. Tio estas la ĉefa aserto de lia libro, kiun aperigis **Stafeto** en la serio **Movado**.

Cl.- Ĉiu esperantisto havas, eĉ se minimume, la konvinkon en sia koro, ke esperanto havas en la estonteco bonan ŝancon. Sed multaj estas turmentataj de duboj. Legante la libron de Werner Bormann ili pliprofundigos siajn konojn pri la nuna situacio de esperanto rilate al la lingva situacio en la mondo, kaj ili komprenos, kial Werner Bormann estas optimista.

A.- Kiu estas Werner Bormann ?

Cl.- Werner Bormann fariĝis esperantisto tuj kiam tio ree eblis en lia hejmlando : post la milito. Ekde 1949, tiam 17 jarojn aĝa, li aktivis en la movado, interalie kiel vicprezidanto de Germana Esperanto-Junularo kaj inter la studentaro.

A.- Li do jam frue estis movada funkciulo.

Cl.- Poste Werner Bormann dum kelkaj jaroj estis spektanto. Li kontentiĝis atentigi esperanto-funkciulojn pri labor-plibonigoj. Liaj universitataj spertoj, la enpenetro en la sciencon mondon diktis al li, ke nur scienca bazigo de argumentoj povas doni firman teorion fundamenton al esperanto.

A.- Werner Bormann ne restis longe pasiva spektanto kritikema. En 1960 li transprenis lokajn funkciojn en Hamburgo, en 1965 li eniris la estraron de Germana Esperanto-Asocio, kies prezidanto li nun estas, kaj en 1967 li ekpartoprenis en la vivo de la internacia movado. Kaj ni ĵus aŭdis, ke li eniris tiun ĉi jaron la estraron de UEA.

Cl.- Paralele iris lia profesia evoluo, kiu avancigis lin al direktora posteno en ministerio por ekonomio kiel departementestro por principaj demandoj de la estonta evoluo, fako sufiĉe firme ligita al esperanto kiel universala lingvo de la estonteco. Multaj spertoj aplikendaj en la esperanto-movado venas de liaj profesiaj konoj.

A.- Unu el liaj gravaj lernaĵoj estas, ke nur sobra argumentado povas efiki. Ne utilas informi fremdulojn pri la sentimentala valoro, kiun la Lingvo Internacia havas por la samideanoj. Al eksteruloj nur imponas science interligitaj ideoĉenoj.

Cl.- Ofte Werner Bormann parolas dum esperanto-manifestacioj, kaj en la libro *Bona Ŝanco* ni povas relegi serion de 12 prelegoj pri la Lingvo internacia kaj la sociaj sciencoj.

A.- La titoloj de tiuj prelegoj donas ideon pri la enhavo de tiu 250-paĝa libro :

Cl.- Eŭropo kaj ĝia lingva problemo. Esperanto en la lernejojn. Unesko kaj la Jaro de Internacia Kunlaboro. Situacio kaj ŝancoj de esperanto en la nuna fazo de la evoluo. Situacio kaj ebloj de la esperanto-movado. Sciencaj obstakloj por internacia lingvo. Internaciaj rilatoj kaj internacia lingvo. Mondtrafiko kaj mondlingvo. 80 jarojn esperanto. Homaj rajtoj kaj lingva diskriminacio. La oficiala enkonduko de esperanto.

A.- Legante tiujn prelegojn oni sentas, ke Werner Bormann troviĝis antaŭ publiko. Li verkis en la parola stilo, kio multe faciligas la legadon de lia libro. La frazoj estas plej ofte mallongaj. Oni bone sentas la disvolviĝon de la argumentado.

Werner Bormann

Bona Ŝanco

Claude Gacond, 413-a radioprelego, 1971.09.08 & 11

Cl.- En ĉiu prelego estis necese ripeti iujn fundamentajn principojn. Pro tio supraĵa kaj rapida tralego povas doni la impreson, ke Werner Bormann konstante ripetas la samajn ideojn. Pli atenta tralego tute forigas tiun impreson.

A.- Oni sentas, ke Werner Bormann provis resumi sian penson. En unu horo aŭ iomete pli li devis ofte pritrakti temojn, kiuj estus bezonintaj pli da tempo. Plie li devis paroli al publiko nefaka. Pro tio li kelkfoje donas la impreson esti supraĵe tuŝinta temon. Sed poste, alvenante en alia ĉapitro, oni subite rimarkas, ke tie li revenas al la pritraktitaĵo, kaj ke li alportas la argumentojn, kiuj mankis en la pasinta ĉapitro. Pro tio tiu prelegaro formas tuton.

Cl.- La venontan semajnon ni legos al vi kelkajn paragrafojn el tiu libro *Bona Ŝanco*.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-